| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Heinrich Heine, | Heinrich Heine, | Heinrich Heine, | Heinrich Heine, | Heinrich Heine, |
| **Im Mai** | **En Majo** | **En la mirida bela Maj'** | **En admirinde bela maj'** | **En dolĉega Maj'** |
| | *tradukita de Manfredo Ratislavo* | *tradukita de Kálmán Kalocsay* | *tradukita de Hans-Georg Kaiser* | *tradukita de Friedrich Pillath* |
| Im wunderschönen Monat Mai,<br>Als alle Knospen sprangen,<br>Da ist in meinem Herzen<br>Die Liebe aufgegangen. | En Majo, kiam ĉiuj<br>Burĝonoj malfermiĝis,<br>La amo kiel floro<br>En mia kor' estiĝis. | En la mirinda bela Maj',<br>dum sin burĝonoj fendis,<br>en mia kor' la amon<br>mi disvolviĝi sentis. | En admirinde bela maj',<br>dum jam burĝonoj krevis,<br>jen ankaŭ miakore<br>la amo sin eklevis. | Printempe en dolĉega Maj',<br>Dum la burĝonoj krevis,<br>El mia koro ĝerme<br>Amsento sin eklevis. |
| Im wunderschönen Monat Mai,<br>Als alle Vöglein sangen,<br>Da hab' ich ihr gestanden<br>Mein Sehnen und Verlangen. | En Majo, kiam ĉiuj<br>Birdetoj sin aŭdigis,<br>Al ŝi deziron mian<br>Sopiran mi sciigis. | En la mirinda bela Maj',<br>dum birda tril' ne ĉesis,<br>al ŝi sopiron mian<br>konfide mi konfessis. | En admirinde bela maj',<br>dum birdotril' senbridis,<br>jen mi al ŝi sopirojn,<br>dezirojn, ekkonfidis. | Printempe en dolĉega Maj',<br>Dum birda kanto sonis,<br>De l' kora mi sopiro<br>Konfeson al ŝi donis. |
| ... | ... | ... | ... | ... |

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-203-402 (2004-03-24 07:28:07)*

*Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „Buch der Lieder“, im Abschnitt „Lyrisches Intermezzo“, Nr. I.*

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982-11-14.*

*MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.*

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Kálmán Kalocsay *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976).*

*Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)*

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Hans-Georg Kaiser *(Cezar, ∗1954-05-21).*

*Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.*

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Friedrich Pillath *(†1932-04.03).*

*Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)*

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath`*.*